

A M E R I K A
E S P E R A N T I S T O

La Monata Bulteno de la Esperanta
Asocio de Norda Ameriko



A M E R I C A N
E S P E R A N T I S T

The Monthly Bulletin of the Esperanto
Association of North America

Joseph R. Scherer, President
Los Angeles, California

Joseph Leahy, Gen. Sec.

James F. Morton, Vice-President
Paterson, N. J.

Centra Oficejo - 1517 H Street, N. W., Washington, D. C. - Central Office
VOL. 49 No. 11. - 10¢ per copy - Any Land - \$ 1 per year - October 1936

1887 - WASHINGTON LA URBO DE LA JUBILEO KONGRESO DE ESPERANTO - 1937

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Jam por la 28-a fojo la Esperantistoj de la mondo kunvenis per Universala Kongreso --parolante nur unu lingvon. Ili venis el Azio, Afriko, Ameriko. Plej longan vojaĝon faris la reprezentantoj de Japanujo, Ĉinujo kaj Nov-Zelando. Ili ne venis por diskuti, kiom da militŝipoj la diversaj landoj rajtas posedi por protekti sin reciproke. Male ili venis al Wien, la ĉiam belega, sed ne plu tiel gaja ĉefurbo de Aŭstrio, por interkonatiĝi kun la anoj de multaj diversaj patrolandoj por konstati ke tute ne ekzistas "fremduloj" inter homoj de plej diversaj mondpartoj -- en la momento, kiam ili parolas neŭtralan lingvon. Estas mirige kiom forte efikas neŭtrala lingvo, en kiu neniu devas honteti kiel tio estas kutima pro eraretoj kiuj certe okazas se unu parolas la nacian lingvon de alia lando.

La kongreso de Wien estis simila al multaj antaŭaj Universalaj Kongresoj de la Esperanto-Movado. Okazis la Solena Oficiala Inaŭguro, sabate je la 20-a horo en la Imperiestra Kastelo "Neŭe Hofburg," en ĉeesto de plej altaj membroj de la registaro de Aŭstrio, kaj de delegitoj de aliaj nacioj. Por la unua fojo ĉe Esperanto-Kongreso oni montris kaj hisis la unuan Esperanto-Flagon. Ĝi estis aŭtografita de D-ro Zamenhof dum la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer en 1905; kaj estante propraĵo de la Internacia Esperanto-Muzeo loĝanta en la sama Kastelo, la flago povis facile esti montrata. Oni fotografis de ĉiuj flankoj. S-ro F.A. Hamann parolis en la nomo de la registaro de Usono. Kvankam mi havis la saman delegit-komision, mi preferis saluti la kongreson nur en la nomo de F.A.N.A.

Sekvis la kutima "Interkonatiĝa Vespere" en kiu sin renkontis malnovaj gekorespondantoj, eble por la unua fojo, kaj en kiu oni salutis malnovajn veteranojn de la movado, kaj tute precipe la ĉiam afablajn membrojn de la Familio Zamenhof. Dum tiu unua vespero multaj ankaŭ trovis kongres-amikindon, kies amikeco ofte fariĝas eterna amo, -- kiel okazis antaŭe al du bone-konataj usonaj junuloj. Ambaŭ la sinjoroj Parrish kaj Chomette revenis (en pasintaj jaroj) al Usono kun eŭropaj edizinoj, al kiuj nun treege plaĉas loĝi en Kalifornio. Vere la Interkonatiĝaj Vespereoj montriĝas tre utilaj por Esperantujo.

La Urbodomo de Wien estis iluminata speciale je la honoro de la Esperantistoj. La mirinda gotika domego aspektis kiel fea kastelo el sukero.

Dimanĉe okazis la diversaj Di-servoj kun esperantaj predikoj. La plej granda popolamaso venis al la katolika Motiv-Preĝejo, kie Lia Kardinala Moŝto, D-ro Innitzer, Ĉefepiskopo de Wien, celebris la Sanktan Meson, kaj kie okazis multa sukcesa fotografado antaŭ la vere bela gotika preĝejo. Unika estis la posta sceno, kiam la Prezidanto de UEA -- franca generalo -- metis florkronon sur la tombon de la nekonata soldato de Aŭstrujo (lando antaŭe en milito kontraŭ Francujo.) Estis vere solena momento.

Dimanĉe vespere oni prezentis la ĉarman opereton "Blanka Ĉevaleto" al la samideanaro tute en Esperanto, en teatro luprenita eksklusive por la Esperantistoj. Estis evidente ke la prezentado multe plaĉis al la samideanaro. La eniro estis senpaga al la kongresanoj. La tuta opereto marŝis, fluis, kaj kantiĝis tiel facile ke oni plene forgesis, ke oni prezentis ĉion en "artefarita" lingvo. La samideanoj el proksimaj 40 landoj forgesis ke antaŭ iliaj okuloj sin prezentis miraklo. Dank' al nia neŭtrala lingvo ĉiuj sentis sin hejme en familia rondo, kie nur unu lingvo estis parolata.

VORTOJ DE LA PREZIDANTO (Con.)

- 2 -

La Somera Universitato estis pli ol ordinare interesa, La plej multaj parolantoj parolis vigle, entuziasme, kaj ĉiuj instruige. Mi estis invitata paroli pri "Per unu lingvo tra la tuta mondo," temo kiu kompreneble estis facila por globtrotanto.

Sekvis dum la semajno diversaj laborkunsidoj, kun tuta serio da fakkunsidoj. Ne mankis tuta vico da belaj ekskursoj sur la Danubo kaj al la mondfama amuzejo Prater, al la Kastelo Schönbrunn kaj al diversaj proksimaj kaj malproksimaj montoj. Ne mankis vizitoj al la urbodomo, tra la salonegoj de la Imperia Kastelo kaj al multaj aliaj mirindaĵoj. La kongresanoj sin bone amuzis, kaj ĝenerale partoprenis vigle en ĉiuj eblaj aranĝoj.

Sed malfeliĉe la membroj de la Komitato de UEA (la internacia agada komitato) trovis ke la tempo rezervita por ĝiaj kunvenoj ne sufiĉis. Do oni kunsidis preskaŭ ĉiuvespere, ĝis horo kiam la aŭtobusoj ne plu veturis. Ni ne povis ekskursi sur la Danubo, nek partopreni ĉe diversaj aliaj aranĝoj. Eĉ dum la granda balfestoj, kiam la tuta "kongreso dancis," ni kunsidiĝis en kvietaj kambregoj. Sed ĉu iu plendis? Tute ne! La UEA Komitatanoj ĉiuj fidele kunsidatis. Kiel reprezentanto de E.A.N.A. mi estis feliĉa oferti mian kongresan tempon por partopreni en la diskutoj kaj voĉdonado.

Tamen dum la du horoj kiam mi povis ankoraŭ danci kun la kongreso mi bonege min amuzis. Estis ja tiom da belaj kaj ĉarmaj fraŭlinoj el ĉiuj mondpartoj, svedinoj, francinoj, hungarinoj kaj eĉ japanino. Sed inter la multaj kongres-samideanoj, neniu dancis tiel mirinde la Vienajn valsojn, kiel la belaj fraŭlinoj de Vieno mem. Du fajraj orkestroj kiuj ludis alterne apenaŭ lasis la dancemulojn ripozigi siajn piedojn. Neniom antaŭe mi dancis sur pli mirinda pargeto, neniom en pli historia salonego, neniom laŭ pli bonaj orkestroj. Oni bezonis preskaŭ kvin minutojn por valsi laŭlonge de la kvar muroj de la kolosa balsalongo de la kastelo.

La laborkunsidoj estis gravaj kaj ĉiu serioza samideano partoprenis. Sed ne malpli gravaj estis la ekskursoj kaj la balfestoj, dum kiuj la gesamideanoj pli senĝene kaj pli intime povas interkonatiĝi. Multe tro rapide venis la sabato, la lasta tago. La Solena Fermo de la kongreso estis kortuŝa kiel ĉiam. Tuj poste la kongresanoj forflugis kiel el abelujo, hejmen denove, aŭ al postkongresoj. Oni diris al mi ke la postkongreso en Budapeŝto kiun partoprenis 200 gesamideanoj estis vere mirinda. Mi mem tre bone konas la ĉarmegan urbegon kaj la afablajn gesamideanojn (vidu en "Ĉirkaŭ la mondon, ktp!") kaj do facile kredis ke la postkongresanoj estis ege kontentaj. Sed ne malpli lerte kaj afable la samideanaro de Praha bonvenigis centojn da Esperantistoj, kiuj vizitis la centuran urbon survoje inter nordaj landoj kaj Wien. Mi mem spertis tre belajn horojn kun la tieaj gastigantoj kaj kun svedaj kongres-karavanoj.

Kongresoj estas multekostaj por la esperantistoj, sed la mono ne estas elspezata vane. La samideanoj revenas hejmen kun nova entuziasmo, kuraĝo kaj ofereco. Nur kvar kongresanoj venis de Usono. Pli multaj devus iri al Varsovio venontjare, ĉar 1937 estos la ora jubileo de la Esperanto-movado, kaj Varsovio estas la lulilo de Esperanto. Do ĝis la revido en Varsovio! Kaj Vaŝingtono.

Joseph R. Scherer
Joseph R. Scherer.

Our EANA Committees at Work. The work for Esperanto in and through the EANA membership must proceed along three levels -- the personal activity of individual Esperantists, (some isolated, some not), the activity of local clubs, and the special activities of the general organization. The work of the national organization as such is carried out chiefly through its officers and its annual committees.

The list of committees for this year has not before been published systematically. For convenience, also, the list of officers is here repeated. (Since space cannot be given for this list in each month's issue, save carefully the present number.)

President. Joseph R. Scherer, 4474 West Adams, Los Angeles, California.

Vice-President James F. Morton, Paterson Museum, Paterson, New Jersey.

COMMITTEES AT WORK. (Cont.)

- General Secretary. Joseph Leahy, 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.
Assistant Secretary. Kenneth F. Rogers, Washington, D. C.
Treasurer. Miss A. Josephine Kruka, Washington, D. C.
Executive Committee. E. G. Dodge, Chairman, 1301 Mass. Ave., N. W., Washington, D.C.
 Joseph R. Scherer - Joseph Leahy
Finance Committee: F. H. McMann, Chairman, 169 Hoosick Street, Troy, N. Y.
 H. B. Hastings, Boston, Mass. W. G. Adams, Seattle, Wash.
Examination Committee. Edwin L. Clarke, Box 14, Winter Park, Florida.
Propaganda Committee. S. C. Eby, Chairman, 320 E. 42nd St., N.Y.C. - Rev. John H.
 Fazel, Topeka Kansas, - Rev. Giles H. Sharpley, Waverly, Iowa.
Publication Committee. H. B. Hastings, Chairman, P.O. Box 250, Boston, Mass.
 Joseph Leahy - Kenneth F. Rogers
Committee on Esperanto in Schools. Louis Dormont, Chairman, 123 E. 35th Street,
 Brooklyn, N.Y. - Supt. Gilbert Nickel, Middletown, Delaware,
 Norman A. McQuown, Brown University, Providence, R. I.
Committee on "Friends of Esperanto." Lee Stern, Chairman, 2995 Lincoln Blvd.,
 Cleveland, O. - Armin F. Doneis, Chicago, Ill. - Fred A.
 Hamann, Wauwatosa, Wisconsin.
Esperanto Press Service. Woodruff W. Bryne, Director, 211 Washington Street, Atlanta,
 Ga. - Hugh L. Shatford, Assistant Director, 1244 5th St.,
 N. E., Washington, D. C.
Director of Young People's Department. Rev. John H. Fazel, 1040 Garfield Avenue,
 Topeka, Kansas.

Beside the above, a committee to approach the problem of eventual legislation favorable to Esperanto was voted at the Detroit Congress, on motion of Joseph W. Dubin of Philadelphia. Delay has been encountered in establishing the full personnel of this committee, which will be announced later.

 ASSOCIATED PRESS news note on editorial page Washington, D.C. "Star", Sunday, Sept. 20, 1936: "Esperanto, the "international auxiliary language", is understood by 60,000 Austrians and 15,000 Viennese, among them 150 policemen, 80 street car employees and 130 railway conductors. The figures are published in connection with the annual convention here of the international Esperanto organization. It was also said that Japan has the most Esperantists of any country, with Sweden, Holland, Spain and Austria ranking in that order in number of Esperantists among continental countries." (news note from Vienna, Austria)

 FOLK SONGS in ESPERANTO. - Our attention has just been called to an article in the April issue of "The Musician", entitled "Nationalism as revealed in the Folk Song", by Madelene Mevo, Geneva, Switz. - Original in Esperanto - and translated into English by our Fervorulo Francis H. Sumner, Santa Barbara, California. It is well written and shows the Folk Song so aptly portraying the characteristics of the various races - national histories in themselves - suffering people, profound songs; peaceful people, tranquil songs.

 ANONCO: "Mi deziras ricevi ne pli Esperantaĵojn; Turismaĵojn; Libretojn aŭ aliajn presaĵojn, Gazetojn, Glumarkojn ktp. Conrad Fisher, Meadville, Pa."

 "Short Outline of Esperanto" by J. J. Sussmuth, published by American Esperanto Institute, Rockford, Ill. 32 pages, 10¢. A summary of some of the advantages of Esperanto for travellers, scientists, collectors and business purposes. Not a textbook.

"ESPERANTO TRIUMFONTA" the new weekly organ of the Esperanto movement - taking the place of the recently liquidated "Heroldo de Esperanto", by the Nederlanda Esperanto-Centro, Schiedamseveg 209 B, Rotterdam W., Holland, carries much news about our President's movements through Europe, on his lecture tour. All serious Esperantists should have this paper - \$1.00 for three months.

 "EL VERDAVALO" a well printed and interesting collection of personal experiences in the tropics - in one place the author tells us *ĉiu fenestro ĉiu pordo restas ĉiam nefermita; la domrabistojn oni ne timas; oni loĝas inter sovaĝuloj-ne en civilizacio centro*". The pictures of tropical life are well drawn and repay reading; considering that the editorial sanctum is located 1200 miles from the press room, and that the printers know nothing of Esperanto, it is astonishing that so few typographical errors are found. It is published in three sections, each priced at 18¢. We have a supply on hand, so you will not have to wait, or send to South Seas.

 NOVA ESPERANTOHEJMO en Parizo. Dank' al la progresado de la membraro, nova Esperantista Hejmo estis malfermita en Parizo-34 rue Chabrol. (From "Norwegian "Esperantobladet")

 FROM THE NUMBER of repeat orders for "Friends of Esperanto" blanks, looks as if there is keen competition going on as to who will have the largest list. One young lady says, "It is a wonderfully instructive experience - I find that I have to become better posted myself, in order to answer, intelligently, all questions asked by those canvassed".

 OUR GRAND OLD MAN of Esperanto, Mr. H. B. Hastings, having finished his work in this city has returned to his home in Saugus, Mass., an event that has left everyone who knew him in a state of bewilderment. He was beloved and respected by all, and all are hoping that it will be necessary to recall him for further research work - he being a specialist -- To many of the local fervoruloj it does not seem possible to function Esperantically without "our dear Mr. Hastings". Bonŝanco kaj saluto H.B.

 S-ro Gusten Jungren, RFD #2 San Benito, Texas, deziras korespondadi kun liberpensuloj de ĉiuj landoj, pri tempj. relegiaj kaj filozofiaj. Speciale: hio estas la celo de l'vivo.

 ESPERANTAJ HISTORIETOJ, by Peter Frey. A book of easy short stories in Esperanto. Just what you have been looking for. Introductory price, 30¢ Prepaid. ORDER NOW. American Esperanto Institute, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.

 GRAVAS por FILATELISTOJ: Jubileajn memoro-kaj aerpoŝtmarkojn de Rusio mi vendos aŭ intersangos kontraŭ Esperanto librojn. Kunproponoj turnu vin al Alex. Gerasmichev, Lunacharskogo 50, Rostov, Jaroslavskij, Russia.

 CYCLING ESPERANTISTS. Two Medical students (enthusastic ESPERANTISTS) - Victor Scarffia and Vincente Gregori Espasa - left Buenos Aires, Argentina, Jan. 1st 1934 on a tandem bicycle for a 14,000 mile trip to Washington, D.C. where they arrived Sept. 8th 1936. They were met by companies of Boy Scouts, ESPERANTISTS and a platoon of motorpolice, and escorted to the Argentinian Legation, to meet the Minister of Argentina, afterwards going to the Pan-American Building where photographs were taken, and from the Patio, over Columbia Broadcasting Co's network, Mr. Scarffia - in fluent Esperanto - told of their experiences by cycle, foot and mule-back (very much) over plains, deserts, mountains and trackless jungles of South and Central America, combating hunger, sickness, intense heat and bitter cold. A wonderful experience, but they do not care to repeat it. They expect to meet President Roosevelt before leaving. (The two big parrots in the Patio insisted on being heard over the radio also - so do not imagine that their interjections were throat noises of our guest)

SE VI ESTAS AMIKO de E.A.N.A. kaj U.E.A. PAGU TUJ VIAN KOTIZON
X*X*X*X*X*Y*Y*X*Y*X*X*X*X*X*X*X*X*Y*X*X*X*X*X*Y*X*X*X

MEMBERSHIP RATES - FIXED AT 28th CONGRESS

Membership in E.A.N.A. and U.E.A., with "Amerika Esperantisto".....\$1.50

TEXTBOOKS: "Practical Grammar" by Dr. Ivy-Kellerman Reed, member of the World Language Committee. A course suitable for all grades-has no superior. The most popular textbook on the American market.....75¢

FRODING'S "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons.....10¢

SUSSMUTH'S "American Esperanto Key" - Grammar and Vocabulary.....05¢

"EDINBURGH POCKET DICTIONARY" 288 pages, size 4Xo, indispensable to any Esperantist-you will want one eventually-GET IT NOW.....\$1.10

MILLIDGE Esperanto-English Dictionary, 500 pages.....\$2.75...and RHODE'S English-Esperanto Dictionary, 547 pages.....\$1.00 a combination that is unbeatable-only a few Rhodes left.....

Easy - and interesting reading: "Fabloj de Ezopo"...25¢, "Zamenhofa Legolibro"..50¢
"Sub la Meznokta Suno".....25¢, "Sep Ridoj".....25¢

"Facilaj Esperantaj Legajoj".....50¢, La Vojo Returne (Remarque).....\$2.00

Akrobato de Nia Sinjorino (Payson).....25¢, Esperanto por la Blinduloj.....05¢

Blanche, Virgulino de Lille (Payson).....25¢ Unu-Bileto (Edogana).....25¢

Dua Kreanto. Poemo. (Sanjurijo).....10¢ Ĉu estas ebla kaj necesa Internacia

Deveno de Esperanto L. L. Zamenhof.....10¢ a Helplingvo.....15¢

Infanmurdo (Japanese drama).....25¢ "Ginevra" (Privat).....25¢

Juneco Kaj Amo (Boards) 50¢ (Paper).....35¢ "Miserere Kaj Thais" (Payson).....25¢

Lando de Argenta Akvo (Roe-Payson).....15¢ Radio Manuelo.....25¢

Mopso de la Onklo (Chasc).....15¢ Jos. Rhodes "Early Days of Esperanto

Princo Vanko (Putman Kaj Beetes).....35¢ in England". (Esperanto).....\$1.00

Rozujo Ĉiumiljara (Wagnalls-Payson).....35¢ Surprises at Sylvia Farm

Rakonto kaj Aventuro (Hall-Barcoll).....15¢ (H. W. Fisher).....15¢

Taso de Amservo (Taylor).....35¢ Baha'u'llah kaj la Nova Epoko.....\$1.25

"Versajetoj".....25¢ "Piramo kaj Tizbeo" (W.G.Adams).....10¢

KONGRESA LIBRO - a splendid souvenir of the 29th EANA Congress, 28 pages.....25¢

(Many are putting this book in their Club and City Libraries)

"La Regno de l'Vero", Fabelo Por Grandaj Homoj - translated from the Russian by

Albert M. Kollner, with foreword by Dr. Tobias Sigel.....20¢

"The Constitution As it is" (of USA) - "The Patriots Primer", compiled so that they

cannot get the wrong answer. It contains: The American's Creed, Lincoln's Gettysburg

Address, The Declaration of Independence and much more.....25¢

ĈIAM PORTU LA VERDAN STELETON. - La Verda Steleto, La Signo de Internacia Komprenigo de

Popolliganta ideo La Magia Ŝlosilo al Homaj Koroj-Esperanto-Emblemo en Butontruo.

Ĉiu Bona Esperantisto Fiere Ĝin Portus. Verda stelo kun ora "E", kaj ora protekto

sur stelpunktoj. Elekto-ŝraŭbo....40; Sava Pinglo...50¢ VI ATENTIGOS LA PUBLIKON

FRI ESPERANTO kaj LA SAMIDEANOJN PRI VI MEM.

Advertising rates for small announcements in "American Esperantist": Classified...01¢

per word - minimum 25 words. Space 1 x 3 1/2 inch, 50¢ - 3 for \$1.00, Send copy by

the 20th.

"A Picture is Worth 1000 Words" - Postage Stamp Type and Size - Photographs, gummed,

ready to stick, from any picture. 100 for \$1.00, 500 for \$4.00, 1000 for \$7.00.

Original returned unharmed. For birthday, gift, graduation - - all kinds of greet-

ing cards. GEM Photos --1 3/4 x2 3/4 -- 25 for \$1.00 or 50 for \$1.50.

PHOTOGRAPHS OF DR. ZAMENHOF 5x7-25¢, 5 for \$1.00, 8x10-65¢.Postage Stamp Size,12-15¢

SAVE ON MAGAZINE SUBSCRIPTIONS - Club and Special Rates. Any offer matched. Any

Magazine. Any Time. Any Where. New or Renewals. Send for list and save money.

Kopioj de "Amerika Esperantisto" estos sendataj al kiu ajn adreso de Usono aŭ

eksterlando kontraŭ sendo de neuzitaj usonaj poŝtmarkoj por 10 cendoj.

*X*X*X*X*Y*Y*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*Y*X*X*X*X*X*Y*X*X*X*X*X*Y*X*X*X

Esperanto Association of North America - - - 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.

Per spo al spo

This announcement is partly written in Ispo, with which one can save an enormous amount of time in writing.

In order to help to wipe out the deficit of E.A.N.A., I offered at the Detroit Congress to give E.A.N.A. all the profits from the sale of the following books thru the Central Office:

Guide to Esperanto (2nd Edition, former Price 25¢).... 15¢

This booklet is intended for self-instruction, class use, and correspondence work, as well as to guide the Esperantist in the study, teaching, use, and propaganda of Esperanto.

Fundamento de Ispografio..... 55¢

La baza libro de ISPO, aŭ Internacia Steno-Pazigrafio, kiu signifas internacia mallongskribo por ĉiuj kaj estas intencata fariĝi la dua skribo por ĉiuj, simile al Esp-o, la dua lingvo por ĉiuj.

Enkonduka Kurso en Esperanta Ispografio..... 25¢

Slosilo de Esperanta Ispografio..... 10¢

In addition, I offer to E.A.N.A. a discount of 40% on the following books sold thru the Central Office:

Beginners' Course in Ispo (For self-instruction)..... 25¢

Guide to English Ispography (For acquiring speed)..... 60¢

Key to English Ispography..... 10¢

Schlüssel der deutschen Ispographie..... 10¢


Clave de Ispografía Española..... 10¢

Correspondence Course in Ispo, including books.....\$2.00


Ĉar Ispo estas intencata ne nur por internacia uzo, kiel por korespondado inter Esperantistoj, sed ankaŭ por iu nacia lingvo kaj por ĉiuj skriblaboroj en la ĉiutaga vivo, mi esperas, ke la tuta Esperantistaro laboros fervore "per Espo por Ispo".

Kun samideana saluto, via Amiko de Espo kaj Ispo, *J.A. Hamann*

Kanto de Amikoj de Esperanto kaj de la Amikoj de Ispografio
Laŭ la melodio de "On, Wisconsin".



1. Es#peranto, helpalingvode la tuta mond' Disvastiĝi ni esperas nia ĝojarond'.
2. Vivu Ispo, helpa skribodela tuta mond' Diskonigi ĝin mi volas nunen via rond'.



1. Es#peranta amikaro, kresku ĉiam pli! Do vivu ni en sankta harmoni!
2. Esperanta amikaro, disvastigu ĝin, Ispografio ankaŭ helpas vin. *J.A.*